STATUTO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

I-ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. Nomo. La nomo de la Asocio estas Kataluna Esperanto-Asocio/Associació Catalana d'Esperanto (KEA).

2. Agadteritorio. La agadteritorio de la Asocio etendiĝas al Katalunio.

3. Sidejo. Pri ĝia sidejo decidas la Plenumkomitato. La nuna sidejo troviĝas ĉe Centro de Esperanto Sabadell, carrer Papa Pius XI, 130, Sabadell.

4. Celoj. La celoj de la Asocio, kiu estas senprofita, estas:

I. Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto sur la agadteritorio, aplikante ĉiujn rimedojn de informado akorde kun la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajto kaj la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj;

II. Instrui kaj diskonigi la lingvon kiel ajn;

III. Ebligi al la membraro praktikan utiligon de la Internacia Lingvo Esperanto;

IV. Okazigi katalunan Esperanto-kongreson kaj aliajn kulturajn aranĝojn;

V. Plifaciligi ĉiuspecajn kulturajn rilatojn inter geesperantistoj;

VI. Kunlabori kun ĉiuj Esperanto-organizoj katalunlandaj, cele al estonta kunfederiĝo;

VII. Kunlabori kun aliaj Esperanto-organizoj aŭ samcelaj neesperantistaj organizoj;

VIII. Instigi la diskoniĝon de la kataluna kulturo tra la mondo kaj la diskoniĝon de aliaj kulturoj en Katalunio pere de Esperanto.

Por la plenumo de siaj celoj la Asocio rajtas akcepti aŭ akiri propraĵojn kaj povas elekti kuratorojn por daŭre posedi tiujn laŭ kondiĉoj difinitaj de la Asembleo.

5. Lingvoj. La oficialaj lingvoj de la Asocio estas la Internacia Lingvo Esperanto kaj la kataluna.

6. Eldonaĵoj. La Asocio eldonas propran oficialan organon kaj aliajn eldonaĵojn laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj kiujn fiksas la Plenumkomitato.

7. Senpartieco. La Asocio estas senpartia. Ĝi strikte observas kaj apogas la principojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

8. Fakaj Sekcioj. Minimume kvin individuaj membroj rajtas proponi al la Asembleo starigon de Faka Sekcio. La prezidanto de Faka Sekcio aŭ membro elektita de ĝi iĝas aŭtomate plenumkomitatano.

9. Komarkaj Delegitoj kaj Lokaj Filioj. Por reprezenti la Asocion en la katalunaj komarkoj, la Plenumkomitato nomumas Delegitojn. La Delegito reprezentas la Asocion, varbas membrojn kaj funkciigas la servojn laŭ la kondiĉoj difinitaj en aparta Regularo. Tiu ĉi Regularo fikas la kondiĉojn por nomigo kaj eksigo de la Delegito. La delegiteco estas sensalajra ofico.

Ĉirkaŭ la Delegito povas ariĝi la lokaj Individuaj Membroj, kiuj formas la lokan Filion de la Asocio en la komarko.

10. Administra jaro. La administra jaro estas la kalendara jaro.

II-MEMBRECO

11. Membro-kategorioj. La Asocio havas Individuajn, Kolektivajn kaj Honorajn Membrojn. La Individuaj Membroj estas: (a) Abonantaj Membroj; (b) Subtenantaj Membroj; (c) Dumvivaj Membroj.

12. Kondiĉoj de Akcepto. Kiel Individua Membro povas esti akceptita ĉiu fizika persono favoranta la Asociajn celojn. Kiel Kolektiva Membro povas esti akceptita ĉiu jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion. Honora Membro povas esti ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu havas aparte elstarajn meritojn por la Asocio aŭ por la Internacia Lingvo.

13. Akcepto, malakcepto kaj eksigo de Individuaj kaj Kolektivaj Membroj. La Individuajn kaj Kolektivajn Membrojn akceptas, malakceptas aŭ eksigas la Plenumkomitato.

14. Rajto al plendo. Kontraŭ la decido de la Plenumkomitato, kiu devas esti skribe motivita, estas ebla plendo al la Asembleo, kies decido estas definitiva. Ĝis la decido de la Asembleo, validas tiu de la Plenumkomitato, sed la malakceptita persono aŭ eksigita membro rajtas prezenti sian plendon persone al la Asembleo.

15. Elekto de Honoraj Membroj. La Honorajn Membrojn elektas la Asembleo surbaze de motivita skriba propono de la Plenumkomitato. Dekono de la membraro rajtas prezenti al la Plenumkomitato motivitan skriban proponon pri kandidato.

16. Devoj kaj kotizoj. La membroj devas observi la Statuton kaj klopodi realigi la celojn de la Asocio. Ili pagas kotizon fiksitan de la Asembleo por ĉiu kategorio. Subtenanta membro pagas duoblan Abonanta-Membro-kotizon por helpi al la Asocio. Dumviva membro pagas dudekoblan Abonanta-Membro-kotizon dum la vivo por plifortigi la Asocion. La Honoraj Membroj ne pagas kotizon.

17. Rajtoj. Ĉiuj Membroj rajtas partopreni en ĉiuj agadoj de la Asocio kaj ĉeesti ĉiujn kunvenojn. Ĉiuj Kolektivaj Membroj reprezentitaj de Individuaj Membroj havas rajton je du voĉdonoj. La reprezentantoj de Kolektivaj Membroj devos esti skribe konfirmitaj de respektivaj Prezidanto kaj Sekretario.

La Honoraj Membroj ne rajtas voĉdoni. Nur la Individua Membro rajtas aparteni al Kontrola Komisiono aŭ al Arbitracia Komisiono. Nur la Individua Membro kaj la Kolektiva Membro reprezentita de Individua Membro havas rajton aparteni al la Plenumkomitato.

III-EKSIĜO KAJ EKSIGO

18. Eksiĝo. Membro, kiu eĉ post admono ne pagis sian kotizon, estas konsiderata kiel eksiĝinta.

19. Eksigo. Membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de la Asocio, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al la Asocio, povas esti eksigita de la Asocio.

IV-ORGANOJ

20. Organoj. La organoj de la Asocio estas la Asembleo, la Plenumkomitato, la Kontrola Komisiono kaj la Arbitracia Komisiono.

V-ORDINARA ASEMBLEO

21. Okazo. La ordinara Asembleo okazas unufoje jare en loko, tempo kaj en la ripoztago kiun la Plenumkomitato decidos. La skribaj invitoj devas enteni la tagordon kaj devas esti senditaj antaŭ almenaŭ monaton antaŭ la tago de la kunveno.

22. Povoj. La ordinara Asembleo estas la supera organo de la Asocio. Ĝi decidas pri la Asociaj laborprogramo, budĝeto kaj agado en la pasinta jaro; elektas aŭ reelektas la Plenumkomitaton por tri jaroj kaj la Kontrolan Komisionon por du jaroj aŭ eksigas ilin el la ofico pro gravaj kaŭzoj eĉ antaŭ la forpaso de tiu tempo; decidas pri la kotizoj; decidas pri Regularoj; kontrolas la financojn; kaj povas fari kiun ajn alian decidon konforme al tiu ĉi Statuto, escepte de ŝanĝo de la Statuto kaj malfondo de la Asocio.

VI-EKSTERODINARA ASEMBLEO

23. Povoj. La eksterordinara Asembleo havas la samajn rajtojn kiel la ordinara kaj kompetentas pri ŝanĝo de Statuto aŭ malfondo de la Asocio. La skribaj invitoj devas enteni la tagordon kaj devas esti senditaj al ĉiuj membroj almenaŭ dekkvin tagojn antaŭ la tago de la kunveno.

24. Kunvoko. La Plenumkomitato povas kunvoki eksterordinaran Asembleon indikante la kaŭzojn. La Prezidanto aŭ sia anstataŭanto devas kunvoki en tempolimo de dudek tagoj eksterordinaran Asembleon, se minimume unu dekono de la membraro tion postulas skribe, en tempolimo de dudek tagoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta postulo.

VII-PLENUMKOMITATO

25. Konsisto. La Plenumkomitato konsistas el Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto kaj tiom da komitatanoj, kiom decidas la Asembleo. Povas ekzisti ankaŭ la oficoj de Vicprezidanto kaj Vicsekretario.

26. Elekto de Plenumkomitato. La ordinara Asembleo elektas aŭ reelektas ĉiujare trionon, minimume, de la Plenumkomitato. Ĉar la efektiva plenumo de la Asociaj celoj implicas, ke nia Asocio estos Landa Asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA), neniu povos samtempe esti membro de la Plenumkomitato de Kataluna Esperanto-Asocio kaj de alia asocio, ankaŭ sub la samaj kondiĉoj en UEA.

27. Reelektebleco. Membro de la Plenumkomitato estas reelektebla je la sama posteno por nur du sinsekvaj periodoj.

28. Rolo. La Plenumkomitato realigas la decidojn de la Asembleo kaj ĉiujare raportas al ĝi pri sia agado. La Plenumkomitato elektas aŭ eksigas la Redaktoron de la oficiala organo de la Asocio.

29. Labormaniero. La Plenumkomitato kunvenas almenaŭ unu fojon trimonate. La laboroj disdoniĝos por ĉiuj membroj de la Plenumkomitato, kiuj klopodos zorgi po difinita tasko.

30. Prezidanto. La Prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Asembleon kaj la Plenumkomitaton.

31. Vicprezidanto. Vicprezidanto laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

32. Sekretario. La Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Asembleo kaj de la Plenumkomitato; kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Asocio kaj ellaboras la planon de la laboro por la estonta jaro.

32b. Vicprezidanto. Vicsekretario laŭnecese anstataŭas la Sekretarion.

33. Kasisto. La Kasisto administras ĉiujn monaferojn de la Asocio kaj kunmetas la jarbilancon kaj proponon de budĝeto.

33b. Reprezentiĝo. La Asocion, manke de Prezidanto kaj Vicprezidanto, reprezentos, en tiu ordo, la Sekretario aŭ la Kasisto

VIII-KONTROLA KOMISIONO

34. Konsisto. La Kontrola Komisiono konsistas el tri membroj, kiuj ne povas esti plenumkomitatanoj samtempe.

35. Rolo. Ĝi kontrolas la financojn de la Asocio kaj raportas ĉiujare al la Asembleo.

36. Kunveno. La Kontrola Komisiono kunvenas almenaŭ unufoje jare.

37. Rajtoj. La Kontrola Komisiono rajtas skribe postuli de la Plenumkomitato la okazigon de eksterordinara Asembleo, se ĝi rimarkas gravajn malregulaĵojn, kiujn la Plenumkomitato rifuzas korekti. Se la Prezidanto aŭ sia anstataŭanto ne kunvokas eksterodinaran Asembleon en tempolimo de dek tagoj, la Kontrola Komisiono havas la rajton kunvoki ĝin indikante la kaŭzojn.

IX-ARBITRACIA KOMISIONO

38. Rolo. La Arbitracia Komisiono decidas pri ĉiuj konfliktoj inter la membroj de la Asocio aŭ inter la organoj de la Asocio kaj la unuopaj membroj, escepte de malakcepto aŭ eksigo de membro, pri kio –laŭ artikolo 14 de ĉi tiu Statuto– kompetentas nur la Asembleo.

39. Agado. La agadon de la Arbitracia Komisiono kaj la rajton al plendo difinas aparta regularo.

X-LABORMANIERO

40. Kvorumo. La kvorumo en Plenumkomitato, Kontrola Komisiono kaj Asembleo estas du trionoj de la respektivaj komitatanoj, komisionanoj kaj asembleanoj.

Se en la Asembleo oni ne atingas tiun kvorumon, tiam la Prezidanto kunvokas duan Asembleon je duonhoro poste. Por ĉi tiu dua kunvoko ne necesos kvorumo.

41. Voĉdonado. Ĉiuj decidoj de la Asembleo, Plenumkomitato kaj Kontrola Komisiono, kun escepto de artikoloj 47 kaj 48, estas farataj per simpla plimulto de la voĉdonintoj. En okazo de egaleco, tiam dua voĉdono estas necesa. Se denove okazas egaleco, tiam decidas la Prezidanto. Por voĉdono validas la nombro de la Individuaj Membroj, kiuj pagis sian kotizon.

42. Sindeteno. Komitatano aŭ komisionano sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

43. Komisionoj. Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Asembleo aŭ la Plenumkomitato povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn, sed ne rajtas transdoni al ili siajn povojn.

44. Respondeco. La Asocio sin devigas materie per la subskribo kaj de la Prezidanto kaj de la Sekretario. La membroj ne respondecas pri la sindevigoj de unuopaj membroj aŭ komitatanoj, kiuj ne estas konformaj al tiu ĉi statuta priskribo.

XI-FINANCOJ

45. Enspezoj. La Asocio ne havas fondan havaĵon. La enspezoj de la Asocio estas: membrokotizoj, monprofitoj de aktivecoj de la Asocio, mondonacoj kaj subvencioj.

46. Asocia Kapitalo. La kotizoj de Dumvivaj Membroj, donacoj superantaj sumon fiksotan de la Asembleo kaj sen specialaj celoj, heredaĵoj ktp. formas la Asocian Kapitalon. La Plenumkomitato decidas pri eventuala uzo kaj ebla investo de la mono; ĝi rajtas elekti specialan administranton.

XII-ŜANĜO DE LA STATUTO KAJ MALFONDO DE LA ASOCIO

47. Ŝanĝo de la Statuto. Por ŝanĝi la Statuton estas necesaj tri kvaronoj de la esprimitaj voĉoj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu aparta artikolo.

48. Malfondo de la Asocio. Por malfondi la Asocion necesas tri kvaronoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj tri kvaronoj reperezentas minimume absolutan plimulton de ĉiuj Individuaj Membroj kaj reprezentantoj de la kolektivoj.

En okazo de malfondo, la eksterordinara Asembleo nomas komisionon, kiu:

I. Likvidas la kurantajn aferojn de la Asocio;

II. Indikas la necesajn rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia Esperanto-organizo, kiu indikiĝos en la decido pri malfondo.